ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang ★ LA PONTO ★ Nr. 12 Dezember 1953

OFICIALA REVUO DE LA GERMANA ESPERANTO-ASOCIO
KAJ DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Nia Majstro rakontas sian vivon

Ne multaj el la malnovaj kaj jam maljunaj, kaj eĉ tre malmultaj el la novaj kaj junaj Esperantistoj konas la leteron, kiun nia Majstro skribis la 21-an de Februaro 1905 al s-ano Michaux, tiama prezidanto de la Esperanto-grupo en Bulonjo-apud-Maro. Tial verŝajne ĉiuj GEA-anoj kaj abonantoj de EP kun intereso, kun ĝojo kaj, sendube, kelkloke kun vera kortuŝo legos la liniojn de homo, kiu estas kara al ĉies koro.

Kara Sinjoro,

Vi petas, ke mi donu al vi detalojn pri mi kaj mia vivo. Tre volonte mi tion ĉi faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas la kaŭzoj:

Por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj;

a) interne en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis ofte treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis;

b) ekstere mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenis al la idealoj en modo, kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akirado de mia pano, kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas; sed ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60-jara.

Mi naskiĝis en Bialystok la 3/15-an de Decembro 1859. Mia patro (m a r ĝ e n e: kiu ankoraŭ vivas) kaj avo estis instruistoj de lingvo. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t. e. la lingvon rusan. Mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (m a r ĝ e n e: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis kvinaktan tragedion).

Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike, kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj sed ne per la buŝo, tial mi libere parolis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane); la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ ok aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur senrajtan fremdulon (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas kaj premegas miajn fratojn; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.

En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro grava malsano (en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana); en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj (mi devas rimarki, ke en la tuta naŭjara daŭro de mia gimnazia lernado, kiel en Bialystok, kiel poste, en Varsovio, mi estis ĉiam la unua en mia klaso; la instruantoj rigardadis min kiel treege kapablan, kaj miaj kolegoj profetadis (m a r ĝ e n e: sen ia envio, sed tre bondezire, ĉar neniam mi havis inter la kolegoj ian malamikon), ke mi havos en la vivo ĉiam la plej grandajn sukcesojn; tio ĉi tamen poste tute ne plenumiĝis, kaj mi longe devis batali, ĝis mi ellaboris al mia familio modestan panon). En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo en la reala gimnazio. Mi restis 5 monatojn dome por lerni la lingvojn latinan kaj grekan, kaj poste mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879. Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato. Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortikigis en mi la celadon al unuigita homa familio.

Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varsovion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de Januaro 1885. Mi forveturis tiam en la vilaĝon Vejseje, por komenci kuracistan praktikon. Praktikinte tie en la daŭro de 4 monatoj mi konvinkiĝis, ke mi por

Supre: La plej nova busto de nia Majstro skulptita de nia samideanino Frida Christaller

Por danke memori pri la naskiĝo de l' aŭtoro de Esperanto aĉetu almenaŭ unu libron je la Esperantista Libro-Tago 1953!

la komuna medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresiĝema, kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de la mortantoj) tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de okuloj. Mi laboris en la daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de unu Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kelkan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrujo), kaj en la fino de 1886 mi komencis okulistan praktikadon en Varsovio. Tiam mi konatiĝis kun mia nuna edzino, Klaro Zilbernik el Kovno (ŝi tiam gastis ĉe sia fratino loĝanta en Varsovio). La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio donis al mi la eblon, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem (m a r ĝ e n e: en Julio 1887) miajn unuajn kvar broŝurojn (lernolibro de Esperanto en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca). Baldaŭ poste mi eldonis la „Duan libron", „Aldonon", „Neĝan blovadon" kaj „Gefratojn" (verkitaj de Grabowski), tradukon de „Dua libro" kaj „Aldono", Mezan Vortaron germanan, plenan vortaron rusan, anglan kaj svedan lernolibron, „Princinon Mary", „Adresaron" ktp., kaj mi ankaŭ donis la necesan monon por la eldono de la verkoj de Einstein kaj H. Phillips. Mi ankaŭ donis multajn anoncojn en la gazetoj, dissendis grandan nombron da libroj ktp.

Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formanĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure malgrandaj. En la fino de 1889 mi restis sen kopeko!

Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi Varsovion kaj serĉi mian panon en ia alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro, kaj mi veturis (en Novembro 1889) en la urbon Ĥerson (suda Rusujo), kie ne estis okulistoj (m a r ĝ e n e: tie estis nur unu okulistino), kaj kie mi tial esperis trovi panon por mia familio. Sed mia espero min terure trompis; miaj tieaj enspezoj ne sole ne donis al mi eblon nutri mian familion, sed eĉ por mi mem ili ne sufiĉis malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivado! Mi simple kaj litere, ofte, ne havis eĉ kion manĝi; tre ofte mi restadis sen tagmanĝo! Nek mia edzino nek miaj parencoj ion sciis pri tio ĉi, ĉar mian edzinon mi ne volis malĝojigi, kaj en miaj leteroj mi konstante konsolis ŝin, ke estas al mi tre bone, ke mi havas tre bonajn esperojn, ke mi baldaŭ venigos ŝin al mi ktp. Tamen fine mi ne povis jam pli elteni, kaj mi devis konfesi al mia edzino la tutan mian staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiera, por akcepti de iu monan helpon; tamen la malĝojego kaj la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro (kiu tiam kaj ankaŭ poste neniam rifuzadis al mi sian helpon kaj elspezis por mi tre multe da mono) kaj mi revenis Varsovion esperante, ke nun mia kuracista praktiko iros pli bone. En Majo 1890 mi revenis Varsovion.

Ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj tute ne pligrandiĝadis, miaj ŝuldoj kreskadis. Fine, ne havante jam la eblon pli atendi, mi en Oktobro 1893 transloĝiĝis kun mia familio en la urbon Grodno. Tie miaj enspezoj estis pli grandaj ol en Varsovio, kaj la vivo estis malpli kara. Kvankam ankaŭ en Grodno miaj enspezoj tute ne kovradis miajn elspezojn kaj mi devis ĉiam ankoraŭ prenadi subtenon de mia bopatro, tamen mi pacience tenis min tie en la daŭro de 4 jaroj. Sed ĉar miaj infanoj pligrandiĝadis kaj postulis pli kostan edukadon, kaj la urbo Grodno estas tiel malriĉa, ke okulisto neniam povos tie multe pligrandigi siajn enspezojn, tiel laŭ la insista deziro de mia bopatro mi en la fino de 1897 decidis denove reveni Varsovion kaj fari tie ĉi la lastan provon.

La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia lasta provo, kaj se ĝi ankaŭ nun ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ freneziĝis de malespero. Sed fine, dank' al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista praktiko komencis pli kaj pli grandiĝadi kaj jam de la jaro 1901, ĝi estas tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elspezojn. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon). Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas homoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte: mi devas akceptadi 30-40 pacientojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de 5-10 pacientoj. Tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.

Mi havas nun tri infanojn: unu filon kaj du filinojn.

Mi estas tre laca kaj lacigis ankaŭ vin per mia longega letero. Adiaŭ!

Via L. L. Zamenhof.

(Fonto: Enciklopedio de Esperanto, p. 579)

Publika Esperanto-libraro en Kolonjo!

De Hans Wingen

Ĉu vi jam sciis, ke la Struvelpetro ekzistas en Esperanto? Ankaŭ mi ne. Sed antaŭ kelkaj semajnoj mi iris al la Universitata kaj Urba Biblioteko en Kolonjo kaj elprenis la katalogon pri mondlingvoj, kaj tie mi trovis la Struvelpetron kaj ankaŭ multajn aliajn interesajn Esperanto-librojn. Pri tiu trezoro mi nun volas iom rakonti; la antaŭhistorio estas kurioza.

Kiam la Kolonja universitato post la milito ree malfermis siajn pordojn, ĝia biblioteko estis ankoraŭ en sia milita rifuĝejo; sed post iom da tempo ĝi revenis kaj baldaŭ poste mi esploris, kion ĝi enhavas pri Esperanto. Sed tio tiam ankoraŭ ne estis tre multe; interesa estis antaŭ ĉio la fama „Unua Libro" de Esperanto: la lernolibro de „D-ro Esperanto" por germanoj, elirinta en 1887. Kiel ĝi venis al la Kolonja biblioteko, estas enigmo por mi, ĉar en 1887 ne ekzistis universitato en nia urbo. Krom tiu libreto mi trovis en la katalogo la Originalan Verkaron de Zamenhof kaj la Internacian Lingvonormigon en la Tekniko (de Wüster, germanlingva libro), — gravaj verkoj por ĉiu serioza studanto; krome tie estis ankoraŭ kelkaj aliaj libroj malpli gravaj.

Sed ni Kolonjaj esperantistoj eksciis ankaŭ jenon: Antaŭ la milito en Düsseldorf vivis s-ano T a r n o w, kiu posedis grandegan kolekton da Esperantaĵoj: libroj, gazetoj, glumarkoj ktp. ktp.; tutan domon plenan de Esperantaj objektoj. Kiam venis la milito kaj la danĝero de bombdetruoj, tiu samideano farigis fortajn kestojn en granda formato, 80 kestojn, se mi estas ĝuste informita, kaj li enfermis ĉion en ilin por sekurigi ĝin kontraŭ perdiĝo. Sed poste dum la milito li bedaŭrinde mortis, kaj la kestoj — intertempe transportitaj al alia urbo — en la konfuzitaj tempoj postmilitaj . . . perdiĝis, escepte de dek-ses. Kaj tiujn restintajn — tion ni eksciis — iel akiris la Kolonja universitata biblioteko. Tiam la prezidanto de la Kolonja grupo, s-ro Berger, kontaktis kun la biblioteka direkcio kaj demandis, kiam la libroj estos atingeblaj por la publiko. Ni atendu, estis la respondo, unue la libroj devos esti registritaj. Ni atendis unu jaron, du jarojn, kaj pli longe; la libroj ne aperis. Mi ĉiuduonjare kontrolis la katalogon, sed nenio nova montriĝis. S-ro Berger ree demandis la direkcion, sed ricevis la trankvilan respondon; atendi. (Eble ili havis multe da laboro post la milito.) Ni jam perdis ĉiun esperon, vidi la akiraĵon ankoraŭ en ĉi tiu vivo.

Iam eĉ la katalogo pri mondlingvoj estis for, tute for; en ĝia fako staris karteto: „Ĉi tiu katalogo malaperis". Ŝajne iu ŝatanto (sed ne estis mi! la katalogo enhavis ankaŭ indikojn pri orientaj lingvoj) enamiĝis al la katalogo kaj kunprenis ĝin hejmen. Dum sufiĉe longa tempo la fako restis malplena; probable la direkcio ne volis fari al si la penon reverki la katalogon, sed preferis atendi „trovinton honestan", kiu ĝin redonos. — Intertempe ni eksciis ankaŭ, ke ĝuste tiuj restintaj dek-ses kestoj n e estas tre riĉenhavaj pri libroj, sed entenas precipe alian materialon. Kiel dirite, ni perdis ĉiun esperon.

Iun tagon mi ree venis en la katalogan salonon kaj per unu hazarda flankrigardo ekvidis, ke la koncernata fako L 3, kiun mi jam tre bone konis, denove e n h a v a s katalogon! Ĉu ĝi estas la malnova, tion mi ne povas diri; ĉiukaze mi tiam aliris kaj, elpreninte la katalogon, vidis, ke ĝi fariĝis multe pli ampleksa. Oni do enlistigis la kolektaĵon Tarnow! — Tio okazis antaŭ proksimume unu jaro; mi informis la grupestron, sed mem ne trovis la tempon detale rigardi la registrajn slipojn, ĉar mi fervore preparis min al ekzameno.

(Finota)

Oficiala Parto de Germana Esperanto-Asocio

Oficejo: Köln-Dellbrück, Bergisch-Gladbacher Straße 1095 / Sekretario: Richard Reuchlin, Mannheim-Feudenheim, Körnerstraße 30
Redaktanto: Mathias Schumacher, Köln-Weidenpesch, Fehrbellinstraße 5

EL LA LIGOJ

Nordbavara Esperanto-Ligo (NOBELO)

Esperantistoj, kiuj loĝas en la bavara distrikto n o r d e de la Danubo, estas petataj interrilati kun la informejo de la Nordbavara Esperanto-Ligo, Bamberg, Obere Sandstraße 7.

Sudokcidenta Esperanto-Ligo (SOELO)

La aŭtuna konferenco de la suda distrikto de SOELO okazis la 11-an de oktobro en Wilferdingen apud Karlsruhe (Naturamika Domo).

La prezidanto de SOELO, s-ano Nischwitz, raportis pri la interna stato de GEA kaj la propaganda laboro de la asocia estraro. Post la raportoj de la grupoj kaj izoluloj okazis la elekto de la vicprezidanto por Sud-SOELO. Oni elektis s-anon Bräuer (Karlsruhe). S-ano Heinz (Karlsruhe) raportis pri konferenco de la Bahai-movado en Karlsruhe. Oni menciis, ke la aplikado de Esperanto estas la ĉefa rimedo por realigo de la ideoj de la Bahaanoj. S-ano Weiler (Karlsruhe) raportis pri la konferenco de la naturamikoj en Innsbruck; ek de nun la Esperanta fako (TANEF) estas reprezentata en „Zentralausschuß" per s-ano Coen (Brüssel). La gazeto „La Migranto" aperas duonjare.

La jara ĉefkonferenco de SOELO okazos la 9-an de majo 1954 en Karlsruhe okaze de la ora jubileo de la tiea grupo. La konferenco de la suda distrikto okazos en Bretten.

Esperanto-Ligo Berlin (ELB)

Pri „Eŭropo kaj la lingva problemo" s-ano Kammergerichtsrat Erwin Stolpe faris tre interesan paroladon en la popola altlernejo de Neukölln. S-ano Hans Breitenbach referis en la oktobra kunveno de ELB pri modkantoj kaj s-anino Emmi Stox en la grupo „Kompreno" (Charlottenburg) pri „La telegramo malantaŭ la giĉeto de la poŝtejo". En la „Seminario de Esperanto" parolis s-ano Adolf Sproeck pri la adverbo kaj adjektivo en Esperanto kaj s-ano H. Wietrzynski pri la Lingva Komitato kaj Akademio. La aŭtuna instrusezono vigle komenciĝis per kursoj en la popolaltlernejoj de Wilmersdorf kaj Kreuzberg, en la Germana Sindikatligo kaj en kelkaj aliaj rondoj ekzamen-preparoj. La rezulto de varbkonkurso, kiu finiĝis la 31-an de oktobro, estas 21 novaj membroj.

Modela vivo esperantista en orienta Vestfalio

9-a Regiona Renkontiĝo de aktiva gesamideanaro en Osnabrück

Bad Salzuflen, Bielefeld, Herford, Bünde, Detmold, Bielefeld, Bünde, Herford. Jen la vico de urboj, inter kies muroj okazis la regionaj renkontiĝoj de esperantistoj el orienta Vestfalio kaj Lippe, tradiciiĝintaj kiel harmoniaj amikaj kunvenoj dum la lastaj jaroj. Multnombra gesamideanaro el ĉiuj partoj de la distrikto ĉiam partoprenis tiujn „kongresetojn", kiujn iniciatis antaŭ kvin jaroj kelkaj aktivaj grupoj. Ofte el malproksimaj lokoj venis esperantistoj por partopreni la aranĝojn. Eĉ gastoj el Danujo kaj Nederlando sentis sin hejme en la rondo de la vigla ĉeestantaro.

Same estis en Osnabrück, kien la tiea Esperanto-grupo invitis la esperantistaron por la 9-a regiona renkontiĝo, okazinta la 19-an kaj 20-an de septembro. Lerte preparita de la Osnabrück-aj geamikoj ĝi allogis ĉirkaŭ 80 verdstelulojn el proksimaj kaj malproksimaj distriktoj kaj el Nederlando. Kaj estis neniu inter ili, kiu pentis la ĉeeston.

Kore kaj ĝoje akceptite de lokaj gesamideanoj en la stacidomo, la gastoj estis gvidataj tra la malnova urbo dum la sabata posttagmezo. Lertaj amikoj donis interesajn klarigojn pri la vidindaĵoj kaj elmontris sciindajn faktojn pri okazintaĵoj el antikvaj epokoj. La vespero kunigis ĉiujn en amika rondo. Rapidege forflugis la horoj dum kantado kaj babilado.

Dimanĉon matene la kunveno estis oficiale malfermata en la famkonata historia pac-salonego de la impona urbdomo. Reprezentanto de la senato bonvenigis la esperantistojn en tiu ejo, atentigante pri la simboleco de la malfermo de esperantista kunveno en la sama salono, kie estis kontraktita la paco post la 30-jara milito. Nome de la loka Esperanto-grupo salutis la gastojn s-ano Damschen, sekvita de s-ano Schneider (Niedermarsberg), kiu kiel oficiala reprezentanto de GEA transdonis la bondezirojn de la asocia estraro.

Poste en la kadro de publika varbkunveno tre bone vizitata s-ano A. Scholz (Herford) konvinke referatis pri „Celoj kaj valoro de Esperanto", elmontrante la gravajn sukcesojn atingitajn de la esperantistoj. Sekvanta vigla diskutado pruvis, ke lia referato trovis dankeman aŭskultantaron.

Posttagmeze s-ano von der Heid (Bielefeld) skizis la taskojn de la lokaj Esperanto-grupoj per interesa referato. Kiel klarvidanta praktikulo li precipe akcentis la neceson de pliaktivigo de la unuopaj gesamideanoj kaj la edukadon de junaj aktivuloj esperantistaj. Lian referaton sekvis atentinda alvoko de s-ano H. Scholz (Osnabrück) pri metodoj de moderna varbado poresperanta en la publiko.

Daŭrigis la programon raporto de s-ano Giessner (Bielefeld) pri la Zagreba kongreso kun prezentado de fotoj, kiujn faris la raportanto en Jugoslavujo.

Gaja amika kunestado finis tiun renkontiĝon de la orient-vestfalia esperantistaro, kies bona kunlaborado laŭ la vortoj de la reprezentanto de GEA povus esti modeldona por ĉiuj aliaj distriktoj.

Dankon la ĉeestintaro ŝuldas al la tre aktivaj Osnabrück-anoj pro la multflanka laborado por la aranĝo de tiu impona renkontiĝo, pri kiu favore raportis la ĵurnaloj de Osnabrück. Estu same brila la 10-a jubilea regiona renkontiĝo printempe 1954 en Bad Salzuflen!

Internacia Zamenhof-festo

Sabaton kaj dimanĉon (12. kaj 13. 12.) okazos en Treebek (Nederlando) - ĉirkaŭ 30 km malantaŭ Aachen - belga-germana-nederlanda Esperanto-renkontiĝo. Kiu volas partopreni, skribu tuj al la Esperanto-grupo Düren (Rhld.), Kölner Landstraße 254.

Al ĉiuj membroj de GEA

ni deziras feliĉan Kristnasko-feston kaj bonan transiron en la novan jaron.

Samtempe ni esprimas nian dankon al ĉiuj faciligintaj nian laboron en la nun finiĝonta jaro per akurata pago de la asocia kotizo, per libervolaj mondonacoj kaj antaŭ ĉio per sia aktiva kunlaboro diversmaniera. Je nia granda ĝojo ni konstatis, ke ĉie en nia asocia teritorio multaj fervoraj membroj estis kaj estas agantaj konstante, celkonscie kaj sukcesplene: esperiga fakto por la estonteco de nia movado.

Nia movado, ankaŭ en Germanujo, absolute n e stagnis en la pasintaj monatoj. Certe, la membrara stato ne multe ŝanĝiĝis; sed pli grava estas la konstato, ke en la p u b l i k o la lingvo Esperanto pli kaj pli populariĝis, ke multe kreskis la nombro de tiuj, kiuj pledas favore por ĝi kiel internacia helplingvo.

Laŭ ĉiuj antaŭsignoj la jaro 1954 fariĝos grava kaj eĉ decida por nia movado, kaj en nia lando kaj en la tuta mondo. Pro tio estas necese, ke ni esperantistoj en la Germana Esperanto-Asocio dum la venonta jaro ankoraŭ pli forte kunstaru ol iam antaŭe. La asocia estraro, por povi plenumi sian taskon, nepre bezonas viajn subtenojn financajn kaj moralajn kaj, ne laste, ankaŭ vian aktivan helpon en la propagando. Se ĉiuj membroj kontribuos, ĉiu laŭ sia povo plej bona, ni povas esperi fari en la venonta jaro pluan, grandan paŝon antaŭen sur la vojo de nia movado al la dezirata celo.

La Estraro de GEA

EL LA GRUPOJ

Augsburg. La grupo „Laboro" aranĝis varbkampanjon inter la sindikata movado kaj ekspozicion dum la kongreso de la teksista sindikato.

Bremen. En la nova kurso por komencantoj sub gvidado de s-ro Heinz Barkhausen partoprenas 15 personoj. La kurso okazas en la kadro de la popolalternejа programo.

Hannover. La programo de la Esperanto-societo regule aperas en la oficiala informilo de Kulturring Hannover. Komenciĝis kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Herford. Novaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj komenciĝis.

Kaiserslautern. Renkontiĝo kun sarlandaj gesamideanoj en Homburg (Sarlando). Elekto de nova estraro: d-ro Besold (1-a prezidanto), s-ino Röder (2-a prez.), s-ano Weimer (sekretario), s-ano Lehmann (kasisto), s-anoj Böhm kaj Weinkauf (kasrevizoroj), s-ano Jörg (propagandisto). Oni komencis du kursojn por komencantoj kaj progresintoj.

Köln. Pro grava malsano la meritplena kasisto de la Esperanto-Unuiĝo Grand-Kolonjo, s-ro Peter Haas, demisiis; transprenis la oficon s-ino Grete Hurler. En la lasta grupkunveno parolis s-ro O. Appelstiel pri „astrologio, scienco aŭ superstiĉo?" Nova kurso por komencantoj kun 20 partoprenantoj, inter ili 2 instruistoj (kursestro: s-ro W. Wingen).

Lindau. Post sukcesplena varbparolado, pri kiu la loka gazetaro favore raportis, s-ino Johanna Krauß komencis kurson por komencantoj en la kadro de Volksbildungswerk.

Ludwigshafen kaj Mannheim. Komuna Zamenhof-festo okazos dimanĉon, la 13-an de decembro, 15.00 h, en la restoracio „Zum Neckarstrand", Mannheim, Meßplatz 1 / Dammstraße. Ĉiuj gesamideanoj en la Palatinio, Sudheslando kaj Nordbadenio estas kore invitataj.

Nürnberg. Nova kurso por komencantoj, kiun gvidas s-ro Hönigsberger.

Troisdorf. Nova kurso por komencantoj intertempe komenciĝis.

Tuttlingen. En bone vizitita varbkunveno s-ano d-ro Paul, estro de la popolalternejo, parolis pri „Esperanto, la dua lingvo por ĉiuj". Rezulto: 20 personoj komencis lerni en nova kurso.

Fervoraj fervojistoj

Dank' al la intensa varbado de kelkaj aktivuloj Esperanto multe disvastiĝis en la regionoj de la fervojo-direkcioj Essen, Hannover kaj Kassel, kie nun troviĝas entute pli ol 300 esperantistoj inter la fervojistoj. Sekvas la fervojo-direkcioj Mainz kaj Trier kun entute 140 fervojistaj esperantistoj. Ĉie komenciĝis novaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

La trajnhoraro de la Germana Federacia Fervojo por la vintra sezono denove enhavas esperantlingvan „horarŝlosilon".

Saluto el la Orienta Zono

Kun granda ĝojo mi ricevis la revuon „Esperanto-Post" kaj plej kore dankas. Ĝi estas ree eleksiro por mia Esperanto-persisteco en ĉi tiea malvarmega Esperanto-regiono. Mi sendas entuziasmajn Esperanto-salutojn el malantaŭ la Fera Kurteno!

Via Esperanto-R.

Grupaj renkontejoj

Flensburg: Mathildenstraße 9 ĉe f-ino E. Jacobs (monate ĉiun duan ĵaŭdon).

Frankfurt/Main: Rödelheimer Str. 12 (lunde 20.00 h); Mainzer Landstraße, ĉe ĝardensocieto St. Gallus (sabate 17.00 h).

Hamburg: Pöseldorfer Bierstuben, Milchstraße 7 (ĵaŭde 19.30 h).

Herne: Sindikata Domo (merkrede 19.00 h).

Iserlohn: Piepenstockstraße 7 (merkrede 19.30 h).

Mannheim: Restoracio „Zum Neckarstrand", Meßplatz 1 / Dammstraße (ĵaŭde 20.00 h).

München: Restoracio Zierngibl, Gärtnerplatz (merkrede 20.00 h).

Münster: Kerßenbrockstraße 31 ĉe s-ro Brandenburg (merkrede 20.00 h); fervoja kantino (monate ĉiun unuan vendredon).

Ravensburg: Kafejo „Varma Vando", Markstraße 35 (merkrede kaj vendrede).

Tailfingen: Popollernejo (merkrede 20.00 h).

Wiesbaden: Gastejo „Stadt Luxemburg", Moritzstraße 33 (monate ĉiujn unuan kaj trian lundon 20.00 h).

Oni instruas Esperanton

Laŭ la ricevitaj programoj okazigas la jenaj institucioj Esperanto-kursojn en la vintra semestro 1953/54: Germana Sindikatligo, landa distrikto Bayern, en München kaj la popolalternejoj en Bremen, Büsum, Heide (Holst.) kaj Ulm.

S-ano Heinrich Wielgus, Hamburg-Wilhelmsburg, informis nin, ke ankaŭ „Staatliche Abend-Handels- und Fremdsprachen-Schule der Freien und Hansestadt Hamburg", Hamburg 1, Böckmannstraße 35, envicigis Esperanto-kursojn en sian vintran programon 1953/54. Li proponas, ke oni skribu al la esperantistaj komencantoj por kuraĝigi ilin kaj sendu dankleterojn al la direktoro de la lernejo.

Nachahmenswert . . .

ist das Beispiel der Gemeindevertretung von Welper (Ruhr), die in hochherziger Weise der Lehrersektion des DEB eine Unterstützung von DM 200,— gegeben hat. Der Vorsitzende des DEB richtete an Bürgermeister W. Michels und die Gemeindevertretung ein Dankschreiben.

Tago de la Homaj Rajtoj

En la tuta mondo oni festos la 10-an de decembro kiel tagon de la Homaj Rajtoj. Estus tre bone, se ankaŭ la lokaj grupoj festus tiun tagon per specialaj aranĝoj kun prelegoj dediĉitaj al tiu temo. Tre verŝajne ankaŭ aliaj organizaĵoj (ne-esperantistaj) festos per diversaj aranĝoj tiun tagon. Se oni faros en via loko komunajn komitatojn por tiu celo, estas grave, ke la Esperanto-grupoj partoprenas aktive en la laboroj de tiuj komitatoj. Ni devas utiligi tiajn okazaĵojn ne nur por kontribui al pli bona sukceso de la koncernaj aranĝoj, sed ankaŭ por aŭdigi nian voĉon kaj atentigi pri la kontribuo de la Esperanto-movado al internacia amikeco.

Por la ISAE-membroj

Laŭ sciigo de la sekretario de la germana ISAE-sekcio, s-ano R. Haferkorn, la apero de „Scienca Revuo" prokrastiĝis pro manko de artikoloj lingve sufiĉe taŭgaj. La mankantaj numeroj estos postliverataj. Oni sendu al la redaktoro de la revuo bonajn artikolojn sciencajn kaj teknikajn, eventuale ankaŭ germanlingve. Kiu ankoraŭ ne voĉdonis laŭ la alvoko en EP n-ro 10 sur paĝo 117, tiu estas petata fari tion tuj nun. Kiel kandidatoj estas proponitaj s-anoj d-ro C. Dellian, Willi Köhler kaj R. Haferkorn. Pluaj informoj sekvos per aparta cirkulero.

Florbulboj, ankaŭ en via ĝardeno!

Sub ĉi tiu titolo eldonis Centra Florbulba Komitato, Wilhelminastraat 13, Haarlem, Nederlando, vere belan ilustritan faldfolion kun multaj buntaj floroj kaj konsiloj por floramikoj. La faldfolio estas havebla senkoste ĉe la supre nomita komitato.

Redakcia peto

La redakcio petas ĉiujn, kiujn koncernas tio, ke ili verkas la artikolojn (informojn, raportojn ktp.) kiel eble plej koncizaj. Ni esperas trovi la komprenon de ĉiuj verkintoj kaj verkontoj, se ni estas devigataj pro lokmanko ellasi ĉion, kio ne pravigas retenon de aliaj publikigindaĵoj.

EGS dankas

Al ĉiuj, kiuj sendis gazeteltondaĵojn por la arkivo, dankas Esperanta Gazetaro-Servo en ĉi tiu maniero, ĉar estas neeble fari tion aparte al ĉiu alsendinto. Statistiko aperos komence de la venonta jaro.

GEA gratulas . . .

al s-ano D-ro Walther Rüdiger kaj edzino Christa, Niedermarsberg, Hamekeweg 3, pro naskiĝo de filino Gerlinde.

El inter la nubskrapuloj en Detroit brilas la kristnaska bondeziro en Esperanto

EŬROPO VIVAS VOKAS

ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO-MOVADO ESPERANTISTA

Redaktanto: D-ro Jos. Holtmann, Beckum i. Westf., Hühlstr. 10

Angla-franca dulingveco

De D-ro Wilhelm Herrmann

El la Esperanto-gazetaro fine de la lasta jaro oni eksciis, ke grupo da delegitoj en la Konsilanta Asembleo de la Eŭropa Konsilantaro estis prezentinta proponon celantan enkonduki en Eŭropo anglan-francan dulingvecon por tiel solvi la lingvo-problemon. Tiam tiu ĉi propono malsukcesis pro la sintenado de la germanaj kaj italaj delegitoj. Tamen la grupo renovigis ĉi-jare la proponon. La komisiono por kulturaj kaj sciencaj aferoj aprobis la proponon dum sia kunsido de la 11. 5. 1953 per 13 voĉoj por kaj du kontraŭ kun du sindetenoj. Tial la dulingvisma propono aperis sur la tagordo de la ĉi-jara septembra sesio de la Konsilanta Asembleo. Enkonduko de angla-franca dulingveco signifus, ke la angloj lernas la francan, la francoj inverse la anglan kaj la aliaj eŭropanoj aŭ la anglan aŭ la francan aŭ plejeble ambaŭ tiujn ĉi lingvojn.

Jam fine de aprilo 1953 la germana SPD-parlamentano D-ro Mommer, al kiu mi estis sendinta mian broŝuron „La lingvo-problemo en la Eŭropa Konstitucio", unue informis min pri la renoviĝo de la dulingveca propono kaj promesis, subteni miajn klopodojn. Poste la franca samideano Frangeul de la Esperanto-grupo Angers kompletigis ĉi tiujn informojn rilate al la stato de la afero ĉe la kompetenta komisiono. Krome mi ricevis oficialajn dokumentojn el la sekretarieio de la Eŭropa Konsilantaro helpe de D-ro Mommer. Opiniante, ke la venko de angla-franca dulingveco signifus grandan malhelpaĵon por nia afero en Montevideo, kie venontjare la Unesko decidos pri la Esperanto-petskribo, mi agis en jena maniero:

Kiel memorandon mi ellaboris broŝureton kun la titolo „Dulingveco kiel solvo de la lingvo-problemo en Eŭropo". Esperantlingvan eldonon mi dissendis al la Esperanto-organizoj en ĉiuj ŝtatoj, kiuj estas membroj de la Eŭropa Konsilantaro resp. al la tieaj delegitoj de la UEA, kaj al UEA, UL, SAT, Franca Unuiĝo por disvastigo de Esperanto en Mulhouse, kaj Heroldo de Esperanto. En aldona cirkulero mi petis helpon sugestante, ke oni informu la delegitojn de la koncernaj ŝtatoj eble per traduko de mia broŝuro.

Je mia kontentiĝo respondoj baldaŭ venis el Angluio, Belgujo, Francland, Italujo, Nederlando kaj Sarlando. En la kontraŭ-kampanjo partoprenis:

a) Itala Esperanto-Federacio, forsendante elĉerpaĵon de mia broŝuro kaj personajn leterojn fare de la prezidanto Prof-ro Canuto kiel universitata rektoro;
b) Reĝa Belga Ligo Esperantista per franca traduko de mia broŝuro kaj vizitoj al delegitoj fare de D-ro Kempeneers;
c) la Akademio de Esperanto en Hago per letero resumanta la enhavon de mia broŝuro kaj vizito al la delegitoj fare de s-ano Isbrucker;
d) Brita Esperanto-Asocio, sendante informon kune kun detala raporto pri Esperanto en Britujo, kiun oni siatempe skribis por informi la Unesko-komisionon en Britujo (s-ano Leslie);
e) Sarlanda Esperanto-Asocio per specialaj leteroj kun mia germanlingva broŝuro kiel aldono (s-ano Omlor, St. Ingbert);
f) franca samideano Lienhardt, Mulhouse, peradis rilaton al s-ano A. Schwartz en Straßburg. Tiu ĉi komence de la sesio informis ĉiujn delegitojn per la franclingva raporto pri la internacia lingvo Esperanto, kiun eldonis la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono okaze de la 7a sesio de la Unesko en Parizo. Krome s-ano Schwartz skribis personajn leterojn al influaj delegitoj kaj funkciis kiel observanto.

Meze de aŭgusto mi mem sendis mian germanlingvan broŝuron kun cirkulero al ĉiuj germanaj kaj luksemburgaj membroj de la Konsilanta Asambleo kaj de la Unio por Ŝtalo kaj Karbo kaj al aliaj eminentaj politikistoj, al la ĉefministroj de la germanaj landoj kaj ties ministroj por kulturaj aferoj. Persone mi priparolis la aferon kun la famkonata eŭropa politikisto D-ro von Brentano, kiu petis pri skribaj informoj. Tuj post la balotado li perletere dankis kaj promesis subtenon per jena frazo: „Pri tiu ĉi grava afero estonte mi precipe okupiĝos."

Kelkajn tagojn antaŭ la komenciĝo de la sesio mi denove forsendis specialajn leterojn al ĉiuj germanaj, sarlandaj kaj luksemburgaj delegitoj kaj politike influaj personoj en Germanujo. En tiu ĉi lasta letero mi precipe atentigis pri la stato de la afero ĉe la Unesko.

La Asembleo en Straßburg pritraktis la dulingvisman proponon la 24. 9. 1953. Ekestiĝis vigla kaj longa debato, kiun la germana delegito Edert malfermis. Li interalie diris, ke li preferus tian lingvon, kia estas Esperanto, kaj riproĉis, ke la kulturkomisiono ignoris la Esperanto-petskribon al la Unesko, kaj krome plendis, ke oni ne konsideris la interesojn de la orienteŭropaj nacioj, inter kiuj la germana lingvo estas ege disvastigita. La nederlanda delegito Wendelaar rifuzis Esperanton asertante, ke Esperanto ne estas taŭga pro tro malgranda vortaro kaj pro diverseco de la prononcado. Li scias tion laŭ onidiroj, kiel li mem konfesas! Dum la paso de la tre interesa debato montriĝis, ke la angla-franca dulingveco ne trovus sufiĉe da subtenantoj inter la delegitoj. Fine laŭ propono de la germana delegito Edert oni decidis, redoni la aferon denove al la komisiono kun la mandato ekzameni, kiamaniere konsideri la interesojn de la orienteŭropaj popoloj.

(Fino sur p. 147)



Die werbende Fahne

Seit einigen Monaten weht bei festlichen Anlässen vom Hause Beckum, Hühlstr. 10, eine Fahne, deren Deutung vielen einiges Kopfzerbrechen macht. Es ist die Europa-Fahne mit dem Esperanto-Stern. Die Fahne will werben für ein demokratisches Paneuropa, in dem nicht nur die Diplomaten und Dolmetscher sich verstehen, sondern auch die werktätigen Menschen, die Bauern, die Arbeiter, die Handwerker, die Kaufleute, die Beamten, kurz: alle diejenigen, die nicht Zeit und Geld haben, jahrelang fremde Sprachen zu studieren. Um Esperanto zu erlernen, gebraucht man nur ein Zehntel der Zeit, die man bei andern Sprachen benötigt. Wenn unsere Schulkinder, etwa vom 5. Schuljahr ab, wöchentlich eine oder zwei Stunden Esperanto-Unterricht erhielten, wären sie schon in kurzer Zeit in der Lage, mit den Schulkindern anderer europäischer Länder zu korrespondieren. Das würde ihnen nicht nur große Freude machen, sondern darüber hinaus ein wertvoller Beitrag für die Verständigung der europäischen Völker sein.

LA OPINIO DE LA JUNULARO

Centro de Germana Esperanto-Junularo: Herford, Sandbrede 37. Poŝtĉekkonto: Karlsruhe 545 77 — Redaktanto: Ewald Ebmeier, Bünde i. Westfalen, Weidemaschstr. 28

Mia plej bela TRAVIVAĴO kun Esperanto

Mia unua vojaĝo eksterlanden. Antaŭ eble unu jaro mi eĉ ne povis imagi la efektiviĝon de io simila. Suna tago, adiaŭo de la geamikoj kiel plej grava persono (vojaĝanta ja eksterlanden!), simpatia societo en la kupeo ĝis la duono de la pertrajna vojaĝo enlande — unuvorte: eĉ tro bona humoro! Sed iam la komenca ĝojo, preskaŭ senkiale, influas la postan kontraŭan senton. Post iom da tempo la ĉielon kovris nuboj. La veturado en preskaŭ malplena vagono daŭras plue kelkajn horojn.

Ĉe la ŝtatlimo mi ĉesis esti „grava" persono, ĉar kiel la aliajn oni traserĉis ankaŭ min. La eniro en „eksterlandon" nun subite ekestis por mi tute seninteresa kaj neloga. Mi eĉ iamaniere sentis min vere eksterlande en la senco: for de la hejmo. Ĉu tio ĉifoje estis nur pro la fremdlingvaj demandoj de fremda doganoficisto, al kiu mi ne scipovis respondi krom montrante la pasaĝerdokumentojn, mi ne scias. Ĉu la iom ironia rideto de la konduktoro, ĉu nur mia senkaŭza sugesto?

La veturado ĝis mia unua vojpunkto daŭriĝis teda kaj nesimpatia. La sento, ke vin aliaj ne komprenas same kiel vi ilin, komencis min akompani kiel io stranga. En la fremda urbo mi havis neniun konaton. Mi klopodis trovi Esperanto-societon. Apenaŭ sciante du, tri fremdlingvajn esprimojn, mi ekdemandis trafikoficistinon. Certe estis nur hazardo, ke mi aŭdis de ŝi, iom mokridetante: „Ah, Esperanto!" kun ŝultromova esprimo, ke ŝi ne scias, kie ĝi troviĝas. En la informoficejo oni klarigis en mia nacia lingvo, ke la adreson oni ne scias pro tio, ke ĝi ne ekzistas en la urba adresaro.

Mi finis en la ĉefpoliceio. Tie oni min informis, ke la societeio — ne plu ekzistas! Jam estis krepusko. Mi revenis al la stacidomo, preterpasante la viglon de la grandurbaj aspekto, svarmo, trafiko, neon-reklamoj kaj aliaj interesiĝaĵoj. Al mi, iom laca, ĉio ŝajnis malproksima, for de mi. Mi eĉ estis plej kontenta, sidi kelkajn horojn en la stacidoma atendejo, ĝis la tempo de la foriro de mia trajno al la urbo, en kiu okazos nacia Esperanto-kongreso.

Envagoniĝinte mi baldaŭ ekdormis. La matena tagiĝo vekis min kun — ne plu ŝatata — sento, ke mi troviĝas en eksterlando. Komencis pluveti, sed mi restis ĉe la malfermita fenestro. Mi enpensiĝis, memorante miajn iamajn revojn pri vojaĝoj en fremdajn landojn kun ĉiupaŝaj allogaĵoj, surprizoj, nekutimaj kaj ĝojigaj travivaĵoj.

La tempo pasis kaj la trajnhalto vekis min el la revoj. Apenaŭ nun mi sentis miajn frunton kaj hararon malsekaj. Mi eliris el la vagono. Ne ĉesis pluvi.

Ĉe turista oficejo donas informojn Esperantistoj. Baldaŭas tagmezo. La samideano, ĉe kiu mi devas loĝi, estas surprizita per mia alveno. Li nome ankoraŭ ne ricevis mian ekspres-leteron, ekspeditan antaŭ kelkaj tagoj. Krome li persone estas okupita per kongresaj aranĝoj, li urĝas al tagmanĝo, li evidente ne povas fari pli ol saluti min kaj telefoni hejmen vespere.

Malbona vetero, laciĝo pro la vojaĝo — mi fakte ne sciis per kio plenigi la tempon. Samideanoj, kiujn mi renkontas, estas pliaĝuloj. Ni interparolas kelkajn vortojn, pleje pro scivolemo, ĉar mi estas eksterlandano. Estas nur kelkaj junaj gekongresanoj, sed tiuj preskaŭ tute ne scias Esperanton. La komenco de la kongreso estis posttagmeza ekskurso. Konforme kun la vetero ĝi aspektis al mi enuiga. Posttagmeze ne pluvis, sed la plumbogrizaj nuboj influis evidente la „grizan" humoron. Reveninte urben, mi ne sciis, kien iri. Kelkaj samideanoj, kun kiuj mi interkonatiĝis, vokis min al vespermanĝo, post kiu okazos la Interkona Vespero. Sed mi estis strange nehumora, mi ne ŝatis ĉeesti la aranĝon. La kongreso, al kiu mi venis, iĝis negrava kaj malloga por mi. Ĉu indas veni eksterlanden nur pro iu Esperantista aranĝo? Ekzistas pli interesaj aferoj!

Mi deprenis mian kongresan insignon, por ke ne ĉiu rimarku, kaj eble eĉ primoku, ke mi estas Esperantisto. Vagante tra la urbaj stratoj, mi haltas antaŭ la montrofenestro de filmteatro kaj rigardas fotojn de nova „western"-filmo. La homoj, kun strangkoloraj vizaĝoj sub la fluoreskanta lumfluo, eniras por distri sin dum kelkaj horoj. Ili tie vivas kaj kuniĝas kun siaj amataj kaj konataj aktoroj ĝuante — ne solaj. „Ankaŭ mi eniros, ĉar tie mi eĉ ne bezonas kompreni la lingvon; certe la scenoj mem estos streĉe interesaj!"

Ankoraŭ starante antaŭ lo fotoj kaj pensante verdire pri nenio, mi senkonscie fajfis la melodion de „La Espero". En la rebrilo de l' montrofenestra vitro mi rimarkis junan virinon. Ŝi haltis antaŭ la montrofenestro. Estis mezalta blondulino, preskaŭ kutimaspekta, kiel multaj aliaj, ne superflue bela, sed — eble ĝuste pro tio — simpatia. Post unu, du minutoj ŝi ankoraŭ staris sur la sama loko. Mi turnis la kapon al ŝi. Evidente en tiu momento ŝi volis ion diri, sed kvazaŭ forgesis, kion. Ŝi rigardis min dum momento, baldaŭ turnante la okulojn flanken. Ĉu mi faris same aŭ simile, mi ne memoras.

Cetere, kial ŝi ĉi tie staras, kvazaŭ min atendante? Mi denove turniĝis. Ŝi ekparolis ion fremdlingve kaj ree rigardis min, kvazaŭ ne findirinte la demandon. Ŝi ripetis, kion ŝi jam diris, sed mi ne komprenis kaj ne sciis ion respondi tiumomente. Mi ankoraŭ rigardis ŝian fizionomion, kvazaŭ mi neniam vidis virinon.

„Kial vi min demandas?", subite mi eldentumis. „Ah, vi estas samideano!

La unuan premion ricevis . . .

Momenton, karaj geamikoj! Bedaŭrinde laŭ deziro de la verkinto devos resti redakcia sekreto la nomo de la juna kamarado, kiu laŭ decido de la estraro de GEJ ricevis la unuan premion en la konkurso junulara pri la temo „Mia plej bela travivaĵo kun Esperanto". Ni nur rajtas malkaŝi al vi, ke la ĉefpremiitan konkursaĵon, kiun vi povas legi sur ĉi tiu paĝo, verkis s-ano E. S., studento el Jugoslavio.

Sendube ne estis facila tasko, studi kaj prijuĝi la neatendite multajn konkursajn verkaĵojn, kiujn sendis krom germanaj gejunuloj ankaŭ granda nombro da eksterlandaj geamikoj. Ni vere bedaŭras, ke ne pli multaj premioj estis je nia dispono, ĉar ni ĝoje devis konstati, ke preskaŭ senescepte la senditaj konkursaĵoj estis modelaj laŭ lingvo, stilo kaj enhavo. Post detala ekzameno de ĉiuj ricevitaj verkaĵoj, la estraro de GEJ donis la duan ĝis kvinan premiojn laŭvice al la jenaj konkursintoj:

Margot Wietrzynski, Berlin-Charlottenburg
Reinhold Ritthaler, Neustadt (Weinstraße)
Helmut Lehmann, Berlin-Neukölln
Lucien Giloteaux, Croix (Francio).

Ni gratulas ĉiujn premiitojn pro ilia bela sukceso. Specialan gratulon ni sendas trans la limojn al nia jugoslava anonima amiko pro lia vere majstra rakontaĵo, al kiu ni unuanime donis la unuan premion. Samtempe ni dankas ĉiujn partoprenintojn, esperante, ke tiu aŭ alia, kiu ĉi-foje ne povis ricevi premion, venontfoje estos inter la feliĉuloj.

Je ĉi tiu okazo ni deziras al ĉiuj niaj membroj kaj amikoj ĝojplenajn festotagojn kaj prosperan novan jaron 1954. Al la partoprenontoj de la GEJ-renkontiĝo en Grésillon ni deziras sukcesan laboron kaj ĝojigajn travivaĵojn en Francio

Por la estraro de Germana Esperanto-Junularo

G. J. Brinkmann E. Ebmeier

Ĉu vi eble parolas Esperanton?" ŝi diris konfuzite. — „Mi ne scias vian lingvon. Mi estas eksterlandano", respondis mi. — „Mi volis demandi, kie troviĝas akceptejo por la kongresanoj." — „Se vi konsentas, mi montros al vi."

Ni ekiris kune al la kongresejo. „Ĉu vi ankaŭ venis al nia nacia kongreso?" demandis ŝi. „Jes." — Vi venos certe al la Interkona Vespero, ĉu?" — „Ne, je la oka mi iros en kinejon." — „Strange ... ĉu vi neniam rigardas filmojn, kiam vi estas hejme?" daŭrigis ŝi. — „Ne, tio estas alia afero. Mi havas neniun konaton inter la kongresanoj. Mi ĉeestis ĝis nun la posttagmezan ekskurson kaj ... sed estis enuige. Sed pardonu, mi ne demandis vin, ĉu vi nun alvenis nur?" — „Jes, antaŭ duona horo. Mi volas ĉeesti la Interkonan Vesperon. Estas tio mia unua ĉeesto en Esperanto-kongreso. Kiam ĝi komenciĝos?" — „Je la oka; vi havas ankoraŭ duonhoron da tempo."

Ŝi dankis, alrigardis min. „Ĝis la revido, vespere!" mi eldiris, iel tute forgesinte la kinejon. „Sed, ĉu vi ne diris, ke vi iros rigardi filmon?" ŝi rimarkis. „Ho jes, mi preskaŭ forgesis. Sed ...", subite mi ree volis kontentigi mian scivolemon enkomencan, „kial vi ĉe la kinejo atendis por ĝuste min demandi?" Ŝi surpriziĝis: „Ah, vere mi ne ... Sed mi malfruos por la aranĝo. Bonan amuziĝon!" Ŝi tuj foriris, preskaŭ en momento malaperis, kaj mi restis sola.

Mi reiris malrapide al la kinejo, kvankam min verdire ne plu interesis la filmo. Fakte: mi venis al kongreso, kaj anstataŭ al la aranĝoj mi iras kinejon! Vere mi devis aspekti strange antaŭ la samideanino, mi subite nun konstatis. Eĉ mi forgesis demandi pri ŝia nomo kaj diri al ŝi la mian! „Plej volonte mi ne plu ŝatus ŝin rerenkonti!" Sed mi nun pripensis, ke eble ankaŭ aliaj rimarkos, ke mi forestas la vesper-aranĝon. Mi devus veni al la Interkona Vespero, kaj strange, ke mi pli frue volis pasigi la tempon — en kinejo!

Ĉe la vespero mi ne restis longe. Nur ĝis fino de mallongaj salutparoladoj de la delegitoj. Mi denove sentis min soleca, krome laca mi efektive estis. Mi foriris al mia loĝejo. Ĉu mi same farus, se mi renkontus tie la samideaninon, mi ne scias. Sed mi ne vidis ŝin. Ekstere denove pluvis ...

Hejmenirante, mi subite rimarkis ŝin. Ŝi iris kontraŭdirekte, el la strato, kie estis la kinejo. Kial, mi ne scias, sed tiumomente mi plej deziris preterpasi nevideble. Mi transiris al la aliflanka trotuaro. Kvankam mi ne rigardis flanken, ŝiaj okuloj kvazaŭ akompanis ĉiun mian paŝmovon. Tia estis almenaŭ mia sento.

La morgaŭan tagon estis la kongresa inaŭguro, kaj horon pli frue la diservo. Antaŭ la pordo de l' preĝejo, en kiu ĝi devis okazi, mi vidis la samideaninon atendanta. Ni salutis nin reciproke. Iom mi estis konfuza kaj ne trovis vortojn por paroli ion.

„Ĉu ni interkoniĝu?" fine ŝi ekparolis, same iomete netrankvila. Ni manpremis. Denove mi ne povis depreni la okulojn de ŝia vizaĝo, ne sciante, kiom longe. „Tio estas por pasintvespere", mi eldiris por iel eltiriĝi el la nekonvena situacio. „Jes", ŝi aldonis, „ĉar vi ne venis en la kinejon." — „Sed kial vi tiel malfrue urĝis al la Interkona Vespero?" mi diris senpripense. „Ĉu tio signifas, ke vi tamen vidis min, kiam mi vin rigardis surstrate?" En tiu momento mi plej ŝatus malaperi. Sed tio tamen ne okazis. „Ĉu vi eĉ ne saluti min volis?" ŝi daŭrigis. — „Ho, ne, sed ... sed vi estis sur alia flanko de la strato, kaj ne estus konvene krii ..." Ŝi foriris en la preĝejon; mi restis ekstere ne volante ĉeesti. Baldaŭ mi foriris.

Post la inaŭguro mi renkontis ŝin. Mi volis iel korekti la antaŭajn erarojn. Ankaŭ, ĉar mi ne havis monon por la dua ekskurso, mi proponis foriri posttagmeze al eksterurba banejo. Ŝi estis iom surprizita, kvazaŭ ne kredanta. Sed posttagmeze la bela antaŭa vetero ree ŝanĝiĝis. Mi ne venis.

Ĉirkaŭ la sesa vespere frapetis je la pordo de mia ĉambro. Mi eksaltis el la seĝo. Mi preskaŭ ne pensis, ke povus esti iu alia ol ŝi. Kiamaniere ŝi eksciis la adreson, mi eĉ hodiaŭ ne scias, sed tio tute ne interesis min. La plej grava por mi estis, ke estis ŝi ... Ŝi eniris, ruĝa en la vizaĝo. Mi silentis kelkajn momentojn, kaj tiam ekdemandis, pro kio ŝi venis. Ŝi ankoraŭ pli ruĝiĝis, eble nun rimarkante, ke ŝia preteksto estas ne tro lerta kaj konvinka. Tamen, ŝi jam estis ĉi tie; reen oni ne povis. „Mi volis respondi al via hieraŭa demando, kial mi ĝuste vin demandis surstrate pri la kongresa akceptejo. Kial mi hieraŭ ne rememoris tion! Ja laŭ via kongresa insigno mi rimarkis vin kiel kongresanon."

Mi sciis, ke mi ne portis la insignon tiam. „Vi certe ne venis nur por tion diri!?" Mi tamen ne povis ne rigardi ŝin, ensorbante ŝian allogan aspekton kaj ĉarman simplecon. „Jes, kial vi ne kredas?" ŝi respondis fajroruĝiĝinte. „Sed mi ne volas vin plue ĝeni, mi nur volas ankoraŭ saluti vin, se ni ne plu revidos nin ĝis morgaŭ matene. Tiam mi devos forveturi por reveni ĝustatempe al mia laboro." Ŝia voĉo tremis, kaj ŝi volis foriri ... „Ne foriru tuj", mi diris. „Mi scias bone, ke mi hieraŭ vespere ne portis la insignon." — Ŝi rigardis min preskaŭ pete, tiel ke mi plej volonte tuj ĉirkaŭprenus ŝin. „Estas vere strange, ke ni apenaŭ du tagojn konas unu la alian. Sed ... kial pro tio elpensi neveron?"

Ŝi nenion respondis. — „Eble mi divenas viajn pensojn. Verdire mi ilin komprenas, ĉar eble — la miaj estas la samaj ..."

Ŝia mieno estis tiel milda kaj sincera, ke mi neniam povus ĝin forgesi. „Strange, hieraŭ ni ankoraŭ niajn nomojn ne sciis! Sed ĉu tio gravu?" — Ŝi ne povis plu silenti: „Posttagmeze, kvazaŭ pasus tuta semajno, mi atendis vin kun espero, ke eble, eble vi almenaŭ venus al la renkontejo!" Ni silentis dum momento. „Ĉu mi rajtas ...", ŝi tiam eldiris, „... unu fojon ... nur ĉirkaŭpreni vin?" Mi surpriziĝis, sed ... — Rifuzi mi ne povis — mi ankaŭ ŝin ĉirkaŭbrakis ...

Estis jam tempo por la ĉi-vespera kongresa aranĝo. Ni foriris kune al la vespermanĝo kaj poste al la aranĝo. Dum la tuta vespero mi preskaŭ ne povis depreni la okulojn de ŝi. Ni malmulte parolis. Kvazaŭ mankis al ni la vortoj aŭ superfluis. Ŝi aspektis tro feliĉe ... Eble pro tio ŝi tute forgesis indiki, kiam foriros ŝia trajno morgaŭ. Mi akompanis ŝin ĝis la hotelo, en kiu ŝi loĝis, kaj promesis veni por adiaŭi ŝin morgaŭ ĉe la stacidomo, forgesinte same demandi, je kiu horo. Nur hejmenpaŝante mi memoris tion. Tial mi tuj iris al la turista oficejo. La rekta rapid-trajno al ŝia urbo foriros je la 9.35 h. ...

La alian tagon, ĉe la trajno, mi ne trovis ŝin. De la konduktoro mi eksciis, ke je la 7.55 h. foriras la ordinara trajno, kiu ankaŭ havas nerektan ligon kun tiu urbo ...

Vespere la kongreso finiĝis. Mi ankaŭ forveturis hejmen. Post kelkaj tagoj mi skribis al ŝi, sed la letero revenis kun surstampo „forveturis". De tiam mi nenion plu aŭdis de ŝi. Eble ŝi „komprenis" mian nevenon al la trajno? ... Eble okazis io alia.

Baldaŭ min okupis mia lernado por ekzamenoj. Ĉiutaga kutima vivo fluis pluen. Sed la eta epizodo el ĝia bunta mozaiko neniam estingiĝos en la memoroj de mia Esperantista vivo.

E. S.

Unua interpreta ekzerco

(Vidu en EP n-ro 10 pĝ. 123)

Partoprenis, observante la postulitajn kondiĉojn, tri samideanoj:

Heinrich Frieß, (16) Bensheim
Heinrich Funk, (16) Fulda
Wolfgang Loubier, (16) Altengronau.

Ĉu ne estas interese, ke ĉiuj „interpretistoj" loĝas en la regiono de la poŝtnombro 16?

La premion de 5,— DM gajnis s-ano Loubier. Sed ankaŭ la laboraĵoj de la du ceteraj interpretintoj estas preskaŭ same bonaj. Ankaŭ ili meritas rekonon kaj rekompencon. Sed kiel efektivigi tion? En ĉi tiu dilemo la redakcio ricevis denove neatenditan helpon de nesupozita flanko: Nia samideano R. Brinkmann, la konata stacidoma restoraciestro de Unkel a. Rh., sendis ankaŭ 5,— DM por la traduktaskoj. Per tio ree pruviĝis la vereco de latina proverbo: „Verba docent, exempla trahunt" = Vortoj instruas, ekzemploj efikas. Do ankaŭ la du kromaj solvintoj ricevas premieton de po 2,50 DM, kiujn la redakcio jam sendis.

Esperante ke en la venonta interpreta tasko partoprenos jam pli, ni dankas al la unuaj kuraĝuloj.

La traduktasko 26 sur paĝo 146 NE estas por interpretistoj.



Trifoje akurate je la dekdua horo...

Romano de Walter Galders

EL LA GERMANA TRADUKIS FRIEDRICH ELLERSIEK

Deka daŭrigo

„Ha, kial timi? Li ja ne mordos! Vi povas saluti lin de mi. Kaj kunprenu al li ĉi tiun kajereton. Ĝi enhavas la kolektitajn parolaĵojn de tiu." Per la dika fingro ŝi montris al la malsanulo. „Li jus rakontis diversaĵojn. Mi devis fari al li injekton. Nun li ree dormos du tagojn. Sed nun foriru, por ke neniu vidu vin."

„Kioma horo estas?" demandis Amalio. „Verŝajne mi devas rapidi."

„Duono post la dek-dua. Ĉu vi ne havas horloĝon?"

„Jes, mi havas, sed ĉu porti ĝin? Prefere ne. Oni ja neniam povas scii ..."

Amalio donis la manon al Violeto. „Ĝis revido, Violeto."

„Ĝis revido, Amalio. Vi estas enviinda, la tutan tagon vi povas promenadi."

„Ĉu jam ree envia? Ankaŭ mi ne havas facilan vivon. Ĉu vi scias, kie mi dezirus esti? Hejme, en Pallanza, sidanta sur la lagobordo kaj kaptanta fiŝojn."

„Nu, tio ne realiĝos tre baldaŭ. Vi ja tute ne povas vidigi vin en Pallanza. Sed nun foriru!"

Violeto kvazaŭ elŝovis sian duonfratinon tra la pordo.

Sur la strato Amalio vinke venigis aŭtodroŝkon. „Al stacio San Paolo", ŝi diris al la ŝoforo kaj eniris. En la Stacio San Paolo ŝi prenis la elektran rapidvagonaron al la moderna marbanloko Ostia. En Ostia ŝi eliris kaj de la stacidomo turnis sin al flanka strato, kiun ŝi laŭiris. Post proksimume cent paŝoj ŝi restis staranta antaŭ eleganta vilao. La vilao estis konstruita laŭ plej moderna stilo; granda anteno sur la tegmento konigis la posedanton kiel radioamatoron.

Amalio premis la sonoril-butonon ĉe la ĝardenpordo. Ŝi ne sonorigis kiel ordinara vizitanto, sed donis du Morse-signojn: . — . — — . = A P. La kadropordo aŭtomata malfermiĝis senbrue. Amalio rapide trapaŝis la ĝardenon, en kiu nordlandano estus admirinta palmojn, oranĝ-arbojn, agavojn kaj belegan aŭrakarion, kaj eniris la domon. „Bonan tagon, Luizo, ĉu la Ĉefo estas hejme? Li venigis min ĉi tien", ŝi diris al la servisto.

„Jes, la Ĉefo estas ĉi tie. Atendu momenton, mi venigos lin."

Luizo gvidis Amalion en malgrandan ĉambron, en kiu staris ŝtaltubaj seĝoj kaj simpla tablo. Amalio sidigis sin kaj per fingroringo nervoze klakadis sur la apogilon de l' seĝo.

Post kelkaj minutoj la pordo estis rapide malfermata, kaj la Ĉefo eniris.

Li estis malgrandeta viro kun ruĝega hararo, kian oni tre malofte trovas en Italujo. Ruĝegaj estis ankaŭ la densaj brovoj, kiuj aspektis, kvazaŭ li povus starigi ilin en kolero. Sub la brovoj troviĝis du blankaj okuloj, kies esprimo kaj grandeco konstante ŝanĝiĝis. Jen ili estis malgrandaj kaj spionantaj, jen grandaj kaj minacantaj. La nazo ne estis konforma al ĉi tiu vizaĝo. Ĝi estis malgranda kun suprenigita pinto, tielnomata „ĉielira nazo". Sed la bruta buŝo kaj la akre elstaranta mentono zorgis pri tio, ke la malgranda nazeto neniun trompu pri la karaktero de ĉi tiu viro.

La vesto de la viro konsistis el nigra trejnkostumo, super kiu li havis kitelon el celofano. En la poŝoj de l' kitelo troviĝis preniloj, ŝraŭbtiriloj, malgranda martelo kaj rulaĵeto de kupra drato.

„Bonan tagon, Amalio!" li diris sen iu ĝentileco kaj sidigis sin kontraŭ ŝi. „Kiom da tempo vi bezonas por esti preta por vojaĝo? Mi pensas, ke unu horo sufiĉos."

„Ĉu unu horo? Tio vere estas malmulta. Ni diru tri."

„Vi ĉiam devas marĉandi, oni rimarkas, ke vi estas la filino de butikisto. Ni diru du horojn!"

„Kaj kien mi vojaĝu? Ĉu al Neapolo?"

„Ne, kontraŭe! Al la nordo. Mi atendas karan amikon el Berlino. Jen lia bildo, bela viro. Hodiaŭ li estas, laŭ informo de nia agento, en Airolo. Morgaŭ matene li certe forvojaĝos al Romo. Nun vi scias, kion vi devas fari. Ne estas la unua komisio tiuspeca, kiun mi donas al vi. Vi ja estas unu el la malmultaj virinoj, kiuj scias legi horarojn."

„La viro aspektas tre bone; ĉu okazu al li io malagrabla? Tion mi bedaŭrus."

„Lasu tion al mia zorgo. Tio dependos tute de li. Se li estas sufiĉe malsaĝa, ne okazos al li malagrablaĵo. Cetere mi ne havas tempon por detale klarigi al vi la tutan aferon. Jen la precizaj instrukcioj por vi." Li transdonis al ŝi verdan koverton. „Kaj nun rapide foriru! Post dek minutoj forveturos la vagonaro al Romo!"

„Jes, mi rapidos! Sed antaŭe mi ankoraŭ devas enmanigi al vi ĉi tion." Ŝi transdonis al li la kajereton ricevitan de Violeto. „Do adiaŭ, Ĉefo!"

Naŭa Ĉapitro

Ĉarma vojaĝ-kunulino

„Kiaj homoj envere estas tiuj ses fervojistoj?" demandis sin kriminal-komisaro Neufeld, kiu je la kvina horo matene en Airolo estis enirinta la vagonaron al Romo. „Ĉu ili estas ruzegaj krimuloj aŭ efektive senkulpaj viktimoj de mistera krima potenco, kiun mi ĝis nun ne povas imagi? ‚Kion, kolego Neufeld? Pri tio vi ankoraŭ meditas?' Nombril nun dirus kaj glatigus sian Menjou-barbeton. ‚Ni ambaŭ kune ja arestis en Boulevard St. Michel la Parizajn filianojn de la internacia bando de rabistoj. La viroj, kiuj falegis de sur la kolonoj kaj pontoj, estis perfiduloj, kiujn oni forigis. La artaj-vendisto Borel

same kiel via amiko Lalou, je kies honesteco vi ĵuras! Kaj la fervojistoj? Kompreneble ĉiuj en la servo de la bando! La vagonaroj haltu en la tuneloj, kaj la aliaj membroj de la bando, kiuj certe sidis, elegante vestitaj, en la unua klaso, dume volis prirabi la pasaĝerojn. Kial neniu estas prirabita? Tio povas havi diversajn kaŭzojn. La vagonaroj eble estis tro plenaj. Kaj ke ĉiuj ĉi tiuj okazintaĵoj ensceniĝis trifoje akurate je la sama tempo, tio nepre povas esti lerta artifikaĵo de bone funkcianta regio.' "

„Vi povas esti prava, sinjoro kolego", Neufeld senvole monologis laŭte. Li tuj ekhaltis, kiam la maljuna italo, sidanta kontraŭ li, rigardis lin kaj demandis: „Kion vi diris?" — „Sed", Neufeld daŭrigis sian pensadon, „mia interna voĉo — mi petas, ne ridu tiel nekredeme — ĉiam denove diras al mi, ke ĉi tiu klarigo ne sufiĉas. Ĝi diras, ke io tute alia estas la kaŭzo kaj ke la ŝlosilo de l' sekreto troviĝas en Romo. Ho, mia interna voĉo havas siajn meritojn; jam pli ol unu fojon ĝi restis prava. Ekzemple en la fame konata afero de la virin-vendisto Culebrón el Buenos Aires . . ."

„Lugano-o-o!" Jam Lugano! Neufeld miris. Enpense li disputis tiel fervore kun Nombril, ke li ne havis eĉ unu rigardon por la valo de Tesino. Li nun iris al la fenestro en la koridoro kaj ĝuis la belegan perspektivon al la urbo. La vagonaro glitis tra sub la Monte San Salvatore, veturis poste laŭlonge de la lagobordo kaj transpasis la digon inter Melide kaj Bissone. En Chiasso ree okazis la konataj landlimaj ĉikanetoj, kaj poste la vagonaro veturis tra Como kaj Milano kaj tra la Liguriaj Apeninoj al Ĝenovo.

Mallonga halto en Nervi. La unua, kion Neufeld vidis, estis la konsternita vizaĝo de l' hotelpordisto kun okuloj grandaj kiel te-ta-soj. La komisaro ŝerce minacis al li per la pugno, sed la viro prenis tion serioza, krucosignis sin kaj forkuris sovaĝe. „Nun li ree kuras al la policejo por anonci mian fuĝon. Sed ĉi tiun fojon oni eljetos lin", pensis Neufeld.

La maljuna italo estis elirinta en Sampierdareno. Neufeld esperis, ke li restos sola, sed la ĝojo ne daŭris longe. Jam en Rapallo ĝi estis finata, tamen en la plej milda formo. Bela juna sinjorino kun bluenigra buklokapo kaj beleta malpinta nazo eniris lian kupeon. Ŝiaj grandaj brunaj okuloj sekve de lerta ŝmink-tekniko efikis eĉ pli grandaj, ŝia malgranda buŝo estis intense kolorita.

Ŝi penadis por suprenmeti sian kofron en la pakaĵ-reton. Neufeld tuj eksaltis kaj helpis ŝin. „Multan dankon, sinjoro, vi estas tre afabla", ŝi diris germanlingve kun itala akcento. Ŝi sidigis sin kontraŭ li sur la fenestra loko, metis unu gambon super la alian kaj komencis legi en ilustrita gazeto. „La Domenica del Corriere." Neufeld vidis la unuan paĝon de la kajero: en okultira kolorpreso ĝi montris la falegon de la viro de sur la Kolono de Marco sur Piazza Colonna, kiel la desegnisto de la gazeto imagis ĝin.

Pasis duona horo. La vagonaro veturis tra paradiza pejzaĝo ĉiam proksime laŭlonge de la bluega maro. Mallaŭta kvero igis suprenrigardi Neufeld-on. La juna sinjorino verŝajne estis leginta en la gazeto ion tre amuzan. Ree kaj ree ŝi esplore rigardis lin kaj ĉiumomente rerigardis en la gazeton, kvazaŭ ŝi volus kompari ion.

„Eble ŝi legis spritan rakonton, en kiu verŝajne temas pri ridinda viro, al kiu mi similas", pensis Neufeld. Aŭtomate li ordis sian kravaton. Li sentis sin treege ĝenata kaj eĉ iomete ruĝiĝis. (Daŭrigota)

10 Punkte

wichtig für die Praxis des Anfängerunterrichts — 10 Leitgedanken des Lehrbuchs „Wir lernen Esperanto" von W. und H. Wingen:

△ Lückenloser Aufbau Stein auf Stein △ Klare Regelfassung, sorgfältige Stoffgliederung △ Eingehende Erläuterungen für Einsprachler und Selbstlerner △ Sorgsame Auswahl des Wortschatzes △ Gründlichste Behandlung der Wortbildung △ Praktischer Übungsstoff aus dem täglichen Leben △ Besondere Abschnitte zur Wiederholung und Befestigung △ Im „Anhang" Vertiefung des Gelernten △ Im „Schlüssel" Übersetzung aller Aufgaben und wertvolle zusätzliche Übungen △ Im „Merkblatt für den Kursusleiter" erprobte Winke.

Preis: 2,— DM, Schlüssel —.80 DM zuz. 10% für Porto u. Verpackung

Wer das Lehrbuch kennt, wird es schätzen!

Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Esperanto-Abt.

Je la Tago de la Esperanto-Literaturo kaj de la Esperanto-Libro

aĉetu almenaŭ unu Esperanto-Libron. Vi faros bonan servon al niaj verkistoj kaj eldonistoj kaj vi honoros la memoron pri nia Majstro. Ju pli da libroj vendiĝos, des pli povos aperi. Bonvolu atenti pri nia ĉi-numera aldono.

Wie bereite ich mich auf Esperanto-Prüfungen vor?

Antwort ganz einfach:

Indem ich POST LA KURSO von W. und H. Wingen durcharbeite! Bilden Sie „studrondojn"!

Preis 3,60 DM, zuzüglich 10% für Porto und Verpackung. Schlüssel dazu Preis 1,20 DM.

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

Adventskranz adventa branĉokrono
Auto(maten)marder priŝtelisto de aut(omat)oj
(Jugend-, Arbeiter-) **Bildungswerk** kleriga institucio (porjunulara ktp.)
Bö ventopuŝo, skualo
einsickern (von Agenten) enfiltriĝi
fester Körper (physik.) solidaĵo
Festland ĉeftero; manchmal: kontinento
fördern (Kohle, Erz) elminigi
Geldschrank/knacker; Auto- monŝrank/rompisto; aŭto-
Glas/wolle, ~watte vitra lano
grillen kradrosti
das **Gummi(chen)** kaŭĉuka elastaĵo
(Schokoladen-, Zucker-)**Guß** glazuro
Haff laguno
Hallig sendiga insuleto
Hochstapler kavaliro-fripono
Hungerkünstler fastisto
jugend/frei (Film) permesita por infanoj; infanoj allasataj! **~kriminalität** junulara kriminaleco
Jungfernfahrt unua veturo, inaŭgura -
Kettenraucher kontinue-fumanto
kinder/lieb; tier- infan-ama; best-
(Blut-)Kreislauf sangocirkulado. **~störungen** perturbo de l' s.
Kuchen/form kuk/muldo. **~platte** -plado
Kühlhaus malvarm/domo. **~eier** -konservitaj ovoj
Kußhand perfingra kiso (Handkuß = mankiso)
Lametta bril/fadenoj, -strietoj
Massenmensch kolektiv/ano, amas-
Nehrung laguna terlango
Oberlicht supra fenestreto
Reizwäsche ĉarmiga subtolaĵo
Richtpreis normprezo
Rollschrank rulkovrila ŝranko
Rückvergütung repagaĵo
Vermassung kolektiv/iĝo, -ismo
Vierergespräche kvar-ana interparolo, — konferenco

Hans Wingen

Malgranda rimado pri la fal-ado

Baldaŭ vintro estas venanta
Kaj kaŭzas, ke multo estas falanta!
De la arboj falis la folioj
Kaj la neĝeroj sur abioj.
Falis manĝemo al manĝglaciaĵo —
(Vi eraras pensante ke sekvos rim':
„. . . fal' sur postaĵo".)
Falis hidrargo en termometro.
Pro glatec' sur la strato falis Petro.
Sed feliĉe li falis sur sidvangon.
„Ekstaru! Petro, ĉar neĝlavango
Ekglitos de sur oblikva tegmento
Rapidege sur vin en sama momento!"
Falas guteto de l' nazpinta punkto,
Falas en sterkon ebria adjunkto.
Disfalas ruinoj per vintra ŝtormo
Frakasante vagulon dum enkela dormo.
Eĉ mi foje falis en ekstazon,
Ricevante donace belegan vazon.
Falis impost' por kafo, ĉampano!
Pro tio falis mi, ŝtatano
Germana, fakte de sur la seĝo,
Legante pri tiu nova leĝo.
Car ĝi nur favoras al certa klaso,
Dum malsatas senlaborul-amaso.
Falas svene malriĉa rentulino,
Falas prezo por „Opel-limuzino".
Genufalas „li" dum am-romanco,
„Ambaŭ" falas ĉe „Boogie-Woogie"-danco.
Trans arbradikon falas miopa avin',
Dum amaventuro „falas" virgulin'.
Inter rabistojn falas homo,
Kurzoj falas en borso-domo.
Tra la fenestro falas neĝbulo,
Kiun erare ĵetis petolulo.

Multo falas kaj faladas —
Vivrimedoj antaŭen marŝadas.
Nur la prezoj por la varoj
Grimpas alten ĉiam sen baroj!

Kaj finfine, laŭ kutimo,
Falas pesimisma rimo:
„La tuta vivo estas sterko
De la lulil' ĝis fal' en ĉerko!"

H. S., Braunschweig

Georges Warnier †

La franca esperantistaro perdis pro terura akcidento unu el siaj plej bonaj samideanoj: Georges Warnier. Multflanka esperantisto de post 1903, li faris grandegajn servojn al nia movado en Francujo. Kiel verkinto de franca lernolibro „Esperanto-Manuel" kaj de vortaro Franca-Esperanto li estis aktiva laŭ ĉiuj manieroj. Per siaj bonegaj kontaktoj kun eminentuloj en Francujo li faris gravajn servojn al la movado, helpis ĉie, kie li povis, organizis naciajn kaj internaciajn kongresojn kaj sole lia ĉeesto kaŭzis sukceson de ĉiu esperantista entrepreno. Ni plenkore kondolencas al lia edzino kaj al niaj francaj samideanoj pro la grandega perdo.

Redakcio kaj Eldonejo de EP

Ek al Haarlem!

La GEA-administrejo en Köln-Dellbrück, Bergisch Gladbacher Straße 1095, peras por niaj membroj la transpagojn de la kotizoj por la 39-a UK en Haarlem (31. 7.—7. 8. 1954).

Jen la tabelo kun la kotizoj en germanaj markoj (kalkulita sur la bazo 1 nederlanda guldeno = 1,11 germana marko):

	pagoj		
	ĝis 31.12.53	ĝis 31.3.54	post 31.3.54
	gm.	gm.	gm.
1) **kotizoj normalaj**			
kongresano	21,90	25,30	28,60
edz(in)o de kongresano	11,30	13,00	14,70
junul(in)o	8,00	9,10	10,30
2) **kotizoj por UEA-membroj**			
kongresano	19,10	22,50	25,80
edz(in)o de kongresano	10,00	11,70	13,30

(50 pfenigoj por necesaj ĝeneralaj elspezoj kaj 30 pfenigoj por afrankoj estas enkalkulitaj).

Oni pagu al: Deutscher Esperanto-Bund, Hauptgeschäftsstelle Köln-Dellbrück, Postscheckkonto Köln 310 84.

Aliĝiloj estas haveblaj pere de la grupoj aŭ rekte de nia oficejo.

Ni intencas aranĝi karavanon de Kolonjo al Haarlem.

Traduktasko 26

Bedaŭrinde ne estis eble, aperigi traduktaskon en la Novembra numero.

Hodiaŭ ni prezentas relative facilan taskon. Ĝi estu speciale por la novaj Esperantistoj, kiuj lernis nian lingvon . . . nu, ni diru p o s t la dua mondmilito. Do bonvolu al via sendota tradukaĵo aldoni tiusencan deklaron.

Ni konsilas al vi, fari la tradukon jam baldaŭ, poste lasi ĝin netuŝata dum kelka tempo, kaj fine, antaŭ ol ĝin forsendi, kontrolu ĝin ankoraŭ unu fojon tute ekzakte. Ofte ekzistas du aŭ eĉ pli da eblecoj por traduki unu esprimon. Ne notu ĉiujn! Skribu la plej taŭgan (laŭ via opinio)! Evitu skriberarojn!

La tri plej bonaj solvoj estos premiataj per po unu ekzemplero de La Nekonatino, Niko kaj Nina, kaj La arto fariĝi centjara?

Limdato por la alsendo: 27a de Decembro 1953 (poŝta stampo).

Gefährliche Wahrheit

Der Hofnarr eines Königs hatte einmal gar zu aufrichtig geredet, und deshalb traf ihn die Ungnade des Königs.

Nach einiger Zeit dauerte den König der Arme; er ließ ihn wieder vor sich kommen und fragte:

„Wirst du es wieder wagen, mein Betragen abfällig zu beurteilen?"

„Nein", antwortete unterwürfig der Narr, „ich werde hier niemals sagen, was in der ganzen Stadt die Spatzen schon von den Dächern pfeifen."

Guter Rat

Ein Herr hatte in seinem Keller ein Faß vorzüglichen Bieres, aber zu seinem großen Ärger stellte er fest, daß seine Dienerschaft das Bier ebenso schätzte wie er selbst.

Der Herr fragte seinen Freund, ob er ihm raten könne, was er tun solle, damit seine Diener nicht das gute Bier wegtrinken.

„Sehr einfache Sache", antwortete der Freund, „stelle ein Faß sehr guten Weines daneben!"

Aŭstria Ministerio por Instruaferoj subtenas „Montevideo-Fondaĵon"

Laŭ instigo de s-ano kortega konsilisto Hugo Steiner la Aŭstria Ministerio por Instruaferoj kontribuis al la Montevideo-Fondajo 300 aŭstr. ŝil. Internacia Esperanto-Muzeo en Wien kaj aŭstriaj samideanoj aldonis kromajn 130 ŝil.

Die Arbeitsgemeinschaft westfälischer Esperantolehrer

wurde am 7. 6. 53 beim 8. Bezirkstreffen der Esperantisten aus dem Minden-Ravensberger und Lipper Lande im Herforder Waldjugendheim gegründet. Sie ist nun schon die dritte regionale Esperantolehrer-Arbeitsgemeinschaft (nach Niedersachsen und Hessen) innerhalb der EVDL. Ihr Vorsitzender ist s-ano Lehrer Artur Scholz, Herford, Ahmser Straße 41a. Während des 9. Bezirkstreffens in Osnabrück am 20. September fand die zweite Tagung der Arbeitsgemeinschaft statt. Es wurde beschlossen, die dritte Arbeitstagung am 15. November 1953 in Münster abzuhalten.

Sinjos Sprung über die Grenzpfähle. Eine Schülerin erobert Europa. Von Siglind-Erika Schmalzriedt. Leinenband mit Goldprägung, 13×20 cm, 200 Seiten. Veitsburg-Verlag Ravensburg. Preis 6,50 DM.

Eben habe ich Sinjos Buch aus der Hand gelegt. Ich weiß es mit unbedingter Sicherheit: Wäre ich noch ein Knabe oder Mädchen in Sinjos Alter, es gäbe für mich nichts anderes, als genau wie sie auch mal „über die Grenzpfähle zu springen". Denn ich würde mir mit dem Recht der Jugend sagen: Warum soll ich denn das nicht auch können?

Aber ich bin kein Junge mehr, ich bin, wie Sinjo mich in ihrem Buch sieht, „ein kleiner sportlich schlanker Herr mit angegrautem Haar und immer freundlich lächelnden Augen". Na, als ich vor etwa einer halben Stunde in dieses Spiegelein schaute, da hätte mich doch fast ein bißchen Eitelkeit befallen. Aber Sinjo wollte mich damit gewiß nicht zum Zwecke einer guten Besprechung ihres Buches „becircen", dafür kenne ich sie doch gut genug.

„Die jüngste Autorin der Bundesrepublik", wie sie in verschiedenen Zeitungsartikeln genannt wurde, hat mit ihrem Buch nach meiner bescheidenen Meinung eine doppelte Aufgabe glänzend gelöst: einmal hat sie ein Buch für ihre Altersgenossen geschrieben, das, obwohl es nicht von blutgierigen Wilden, von tollkühnen Cowboys und von haarsträubenden Abenteuern handelt, doch mit derselben Begeisterung gelesen zu werden verdient, denn es ist wahr, es ist ein frisch-lebendiger Erlebnisbericht, es ist die Europa-Reise eines kleinen Mädchens, von ihr selbst erzählt. Allerdings, hie und da scheint ihr doch mal jemand ein bißchen geholfen zu haben, manchmal spricht ein wenig gar viel Weisheit aus der Vierzehnjährigen. Aber das macht gar nichts, und ihre Leser und Leserinnen haben nur Gewinn davon. Zum zweiten hat sie mit ihrem Reisebericht ein Werbebuch für unsere Sprache und Idee geschaffen, wie es bisher noch nicht vorhanden war. Es ist einfach überzeugend und zugleich rührend, wie sie immer und überall, trotz der so verschiedenartigen menschlichen Charaktere, die sie bei Angehörigen der verschiedenen Völker findet, die völkerverbindende, fast evangelisierende Idee unserer Sprache antrifft, oder wie sie, um es ganz trocken zu sagen, überall zu Hause ist. Das hat sie ja dann auch am Ende ihrer Europa-Reise selbst empfunden. „Ich war ja gar nicht im Ausland!", das ist das Fazit ihrer Erlebnisse. Ja, Sinjo, das ist deine großartigste Entdeckung nach deiner Reise: Du bist durch viele Länder gereist, und überall war es anders, und im Grunde warst du doch immer in Esperantujo! Du bist, trotz deiner jungen Jahre, doch schon eine alte Bürgerin des übernationalen Staates, dessen Symbol der grüne Stern der Hoffnung ist. Du bist schon mehr als nur das „Europa-Mädchen" der Zeitungen; denn auch die noch nicht entstandenen „Vereinigten Staaten von Europa" sind in jenem Reiche nur eine Provinz.

Die Austattung des Buches mit dem zweifarbigen Umschlag, von dem uns Sinjo entgegenlächelt, ist tadellos. Gutes Papier, klarer, sauberer Druck. Druckfehler allerdings fehlen doch nicht ganz, und außerdem, kennt der Metteur den typographischen Fachausdruck „H.....-kind" nicht? Es sind einige haarsträubende darin. — Ich hätte die eingestreuten Esperanto-Worte und -Sätze ja lieber mit den entsprechenden Überzeichen gesehen.

Mein Wunsch ist: In keiner Schulbibliothek sollte das Sinjo-Buch fehlen! Und alle esperantistischen — was sage ich: alle Eltern sollten es ihren Kindern schenken. Besser, als Sinjo darin Propaganda macht, können sie es auch nicht!

J. F. B.

Wir freuen uns über jeden Bezieher! Es ist aber wichtig für uns zu wissen, ob Sie die Esperanto-Post als DEB-Mitglied bekommen oder ob das Abonnement für 1954 weiterlaufen soll. Bitte schreiben Sie uns darüber. Wir möchten durch ungerechtfertigte Mahnungen niemanden verärgern.

Verlag der Esperanto-Post

Esperanto gewinnt Boden

bei den Verkehrsämtern Deutschlands

Wenn ein Buchdrucker gleichzeitig auch Esperantist ist, schlägt sein Herz immer dann höher, wenn er die neuen Verkehrs-Werbe-Prospekte in Esperanto zu sehen bekommt. Da schwirrten auf meinen Schreibtisch vier neue Werbeblätter. Bonn, Hannover und Kassel-Waldeck. Besonders das letztere kann sich würdig an die Seite der früher von München und Hamburg herausgegebenen Reiseprospekte stellen. 20 Seiten mit Bildern prachtvoll photographiert, gekonnt klischiert und hervorragend gedruckt. Die zwei Außenseiten in herrlichem Vierfarbendruck. Dazu eine übersichtliche und bunte große Karte. Was da auf dem Papier gezeigt wird, muß in jedem Beschauer den Wunsch erwecken, diese Kostbarkeiten in natura zu sehen. Das ist wirklich ein großer Erfolg der Fervojista Grupo in Kassel, so ein schneidiges Bilderheft mit Esperantotext zu schaffen. So und nicht anders müssen die Reiseprospekte aussehen, die Besucher, im besonderen die Esperantisten, anlocken sollen. Also bitte, lieber Leser, hinsetzen, Reiseprospekt anfordern und — hinfahren ins Land Kurhessen und Waldeck. Aber dort angekommen, bitte sich als Esperantist zu erkennen geben, damit das Verkehrsamt erfährt, wie der Werbeprospekt in Esperanto wirkt. Und so muß es auch mit den anderen Stadtprospekten gehen, obwohl sie nicht so umfangreich sind, wie der von Kassel. Hannover und Bonn erwarten ebenso einen Strom von Esperantisten.

Das Verkehrsamt Hamburg brachte einen neuen Prospekt heraus, der wie der andere sehr, sehr gut aussieht. Auf der einen Seite reizende und zarte Aquarelle aus der Hansestadt Hamburg, auf der anderen Seite zeigen gelungene Photographien das Stadtbild realistischer. Samideanoj, Leser und Leserinnen! Unterstützen Sie die Arbeit der Esperantisten in den genannten Städten und verlangen Sie Reiseprospekte in Esperanto.

-el.

(Fino de paĝo 141)

Angla-franca dulingveco

La debato montras klare:

1e) ke la solvo de la eŭropa lingvoproblemo helpe de naciaj lingvoj havas nur malmulte da ŝanco;

2e) ke ankaŭ supraja scio pri Esperanto kiel lingvo mankas al la influaj politikistoj;

3e) ke Esperanto havas certan ŝancon, kondiĉe ke ni uzas la eblecon, kiun ofertas la politika situacio.

Estas do tasko de la Esperanto-organizoj en ĉiuj eŭropaj landoj, senpere kaj detale informi la delegitojn en la Konsilanta Asambleo ankaŭ pri la lingvo mem.

Ni atingis la celon, kiun atingi ni rajtis esperi: Neaprobon de la angla-franca dulingveco! Laŭdinda estis la kunlaboro! Mi estas konvinkita, ke plej verŝajne nacia egoismo estus venkinta, se ni ne estus nin enmiksintaj. Restas al ni la tasko, influadi la venontajn laborojn de la kompetenta komisiono. Mi petas proponojn! La ŝanco estas por ni!

Aldone al la bildeto

sur paĝo 130 pri Sinjo: Dekstre staras nia GEA-sekretario, s-ano Reuchlin, maldekstre la grupestro de Ravensburg, s-ano L. Schopp. La bildo estas farita dum la „Internacia Feriosemajno" en Konstanco.

Pro pensinterŝanĝado kaj kuniĝo ni petas adresojn de Esperantistoj en la mezrejna distrikto Linz, Unkel, Honnef kaj Königswinter. Bonvolu skribi al R. Brinkmann, Unkel, Bahnhof.

Betr. Intern. Esperanto-Museum in Wien Irrigerweise wurde in EP. Nr. 9 S. 107 eine (alte) Notiz veröffentlicht, daß das IEMW einen Repräsentanten für Deutschland suche. Hauptrepräsentant für Deutschland ist nach wie vor Herr Justizinspektor Heinrich Böcker, Am Hufschmied 12 in Gelsenkirchen-Buer I, der uns bisher außerordentliche Dienste geleistet hat, wofür das IEMW ihm Dank schuldet. Anmeldungen für IEMW und Zahlungen sind auch weiterhin an obige Adresse zu richten.

PETO. Pro la eldono de ŝia libro „Sinjos Sprung über die Grenzpfähle" ĉe Sinjo alvenas amasoj da petoj pro informoj pri Esperanto. Ofte la informpetintoj forgesis reafrankon, ofte Sinjo kaj ŝiaj geamikoj povus respondi per varbiloj, sed mankas al ili la mono! Do ĉiuj aktivaj geesperantistoj estas kore petataj subteni la unikan agadon de Sinjo, kaj sendu varbilojn, poŝtmarkojn, skribmaterialon aŭ kelke da moneroj al Sinjo Schmalzriedt, (14b) Ravensburg, Obere Breite Straße 23. Anticipan dankon.

Serĉata: Vortaro de Bennemann aŭ Christaller, Deutsch-Esperanto kaj Esperanto-Deutsch. Heinrich Schellberg, Köln-Buchforst, Heidelberger Str. 5.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Offizielles Organ des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und der Deutschen Esperanto-Jugend. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Verantwortlich für den Bundesteil: M. Schumacher, Köln-Weidenpesch, Fehrbellinstr. 5. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis für Nichtmitglieder des DEB vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich 0,12 DM Zustellungskosten; Ausland jährlich 6,— DM zuzüglich 1,20 für Porto. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion (außer für den Bundesteil) an Joseph F. Berger, Köln-Riehl. Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt/M., Nr. 12382; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Sparkasse, Hauptzweigstelle Limburg.

Einfaches Weihnachtsgedichtchen

Die schönste Zeit, die liebste Zeit,
sagt's allen Leuten weit und breit,
damit sich jedes freuen mag,
das ist der liebe Weihnachtstag,
der liebe Weihnachtstag.

Den hat uns Gott der Herr bestellt,
den herrlichsten in aller Welt,
daß jung und alt, daß groß und klein
so recht von Herzen froh soll sein,
von Herzen froh soll sein.

W. Hey

Simpla Kristnaska poemeto

Plej bela temp' de l' kalendar'
Kristnasko estas en la jar'.
En ĉiu gajas la imag':
Kristnasko, kia kara tag',
Ho, kia kara tag'!

La Di-Sinjoro faris ĝin,
Por ke ni laŭde gloru Lin,
Ĉu granda, ĉu malgranda hom',
Elkore ĝoju en la dom',
Ĝojegu en la dom'!

Tradukis Jfb.

Heil'ge Nacht

Heil'ge Nacht,
mit tausend Kerzen
steigst du
feierlich herauf —
O so geh
in unsern Herzen,
Stern des Lebens,
geh uns auf!
Schau, im Himmel
und auf Erden
glänzt der Liebe
Sonnenschein:
Friede soll's
noch einmal werden
und die Liebe
König sein.

R. Prutz

Sankta nokt'

Sankta nokt',
kun mil kandeloj
vi leviĝas
en solen' —
stel' de l' vivo
el ĉieloj,
estu bena
via ven'!
Vidu, en ĉiel'
kaj tere
forte brilas
ama sun':
paco estu
iam vere,
kaj la amo
reĝu nun.

Tradukis Jfb.

Alles sieht so festlich aus

Markt und Straßen steh'n verlassen,
still erleuchtet jedes Haus,
sinnend geh' ich durch die Gassen,
alles sieht so festlich aus.

Sterne hoch die Kreise schlingen,
aus des Schnees Einsamkeit
steigt's wie wunderbares Singen —
o du gnadenreiche Zeit!

Joseph von Eichendorff

Ĉio estas nun festeca

Plac' kaj stratoj nun solecaj,
lumoplena ĉiu dom',
atmosfer', medi' festecaj ...
iras mi enmeze, hom'.

Supre ciklojn turnas steloj;
el malsupra neĝa tremp'
ŝvebas supren al la heloj
kant' pri beatiga temp'.

Tradukis Jfb.

Al ĉiuj GEA-anoj, abonantoj de EP, al ĉiuj amikoj de Esperanto

SINCERAJN BONDEZIROJN JE KRISTNASKO!

UNIWERSYTET LUL